

Plu pri Grezijono!

Multaj esperantistoj, ne nur francoj, konas la faman kastelon Grezijono, kiu situas apud la urbeto Baugé [Boĝe] en la regiono de Angers [anĝe] okcidente de Francio. Ĝin estis aĉetinta la esperantista asocio de instruistoj GEE en 1952, dank'al la fervora instigado de Henri Micard. (Enri Mikar)! Ĝi ebligis organizi multegajn esperantajn somer-lernejojn, kongresojn, staĝojn, renkontojn, kulturajn eventojn.



Bildo 1: la kastelo

Tamen, en la dek-kvin lastaj jaroj, ĉiuj povis observi, ke la konstruaĵo ekkadukiĝas! Multaj laboroj necesas, ĉu por anstataŭigi la

malnovegan hejt-kaldronon, ĉu por renovigi la kuirejon, ĉu por bonteni la tegmentojn kaj fasadojn. Pluraj sinsekvaj skipoj sin dediĉis al la giganta tasko kaj iom post iome reaperas espero. La decido pri ludonado al ne-esperantistoj (ekz. okaze de edziĝ-festoj) alportas iom da mono, kio ebligas pliajn riparajnagojn. Uf!

Ĉar la kastelo situas ĉe la kunfluejo de pluraj riveretoj, la vojaĝanto, kiu alvenas vidas lageton maldekstre de la enirvojo kaj naĝ-basenon dekstre. Ankaŭ dekstre staras malgranda, sed admirinda lavejo, kie virinoj lavis la tukaron de la mastroj en la

pasintaj jar-centoj. Ĝis la lastaj dek jaroj ĝin kaŝis dika heĝo da altaj bambuoj, kiujn oni feliĉe eltranĉis!

Ankaŭ tiu edificio estis ruiniĝanta kaj la respondeculoj decidis ne forlasi ĝin: Bonvolema ĉarpentisto Jesse [Ĵes] .kaj teamo riparis la ĉarpentaĵon, en oktobro 2016 anstataŭinte plurajn gravajn pecojn (firsta patno kaj eĝoj) Vidu reportaĵon ĉe <http://www.lecharpentiervolant.com/restauration-dun-lavoir/> .

Bildo 2: Jam riparita ĉarpentaĵo

Poste la ĉarpentaĵon oni provizis per maldikaj bretoj (15mm) el abio. Admiru la senskafaldan laboron!



Bildo 3: Triopo najlas abiajn bretojn sur la ĉevronoj.

La lavejo atendis la sekvan printempon ŝirmita per dika plastaĵo.

Bildo 4: dum lavintio, la lavejo staras antaŭ la baseno sub ŝirmila plasta tuko.

En fino de februaro 2017 fine ariĝis ĝoja teamo (2 ĝis 6-opa) kiu kovris la tegmenton per ardezo-platoj.



La ĉefa problemo konsistis en tio, ke mankis skafaldo! Tial necesis aliri la tegmenton per eskaloj, kiujn necesis movigi konstante. Kaj ĉar antaŭ la lav-flanko fluas akvo 30cm profunda (estas lavejo, ĉu ne?) necesis surmeti botojn!



Bildo 5: La ŝtupetara piedo en akvo!

La pliumulto el la bonvolemluloj neniam estis muntintaj ardezojn. Tial ili inicis sin en la arto tranĉi ardezo-platojn per specialaj amboso kaj martelo, fiksi per pint-hokoj kaj similaj teknikaj aferoj.

Bildo 6: Fred preparas duon-ardezojn

Ĉe la bazo de ambaŭ flankoj de la tegmento ili fiksas listelon el zinka lado kun volvrando, sur kiun eblis apogi eskalojn. Tiel duopo povis munti la unuan horizontalan vicon da ardezoj, fiksitaj per najloj



Bildo 7: Muntado de la unua baza vico (la gut-rando) sur zinka listelo.



Bildo 8: Spite al pluva vetero



Kelkaj ejoj de la tegmento necesigis specialan atenton, kiel la 4 grop-eĝoj, provizitaj per malortaj ardezoplatoj, fiksitaj per hokoj kaj po 2 najloj. :

Bildo 9: Du malortaj ardezo-platoj per vico ĉe la eĝo.

Pro la pluvo, la laboro ne rapide evoluis, sed fine restas bela renovigita tradicia lavejo, kiu longe ornamos la Grezijonan enirejon.



Bildo 10: Ja, finite!

Multaj aliaj laboroj da renovigado, kaj bontenado estas jam antaŭviditaj. Grezijono plu akceptos esperantajn eventojn!

Pierre Grollemund